


EKE



esperanto

**Kunveno: merkredon la 16an de majo 2018a
je la 20.00 h. en “De Uitwijk”,
Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven.
tel. 040-2450590.**

Ĉu kapteblas la tempo? Pri tempomezurado tra la jarcentoj

Jean-Jacques Wintraecken prelegos.

Resumo

Kvankam la homo ne disponas organon por senti kaj mezuri la tempon, nia socio ne povas adekvate funkcii sen tempomezuro. Pro tio la homo antaŭ longe penadas mezuri ("kapti", se tiel diri) la tempon.

La kreskanta interdependeco kaj unuiĝo en kaj inter landoj, spronita de la industria revolucio kaj ĝiaj posteaj evoluoj, postulis nacie kaj internacie normigitajn kaj agorditajn tempojn. Intertempe, la sciencaj kaj teknikaj progresoj tra la jaroj ebligis la kreadon de pli kaj pli precizaj tempomezuriloj, kiel, la mekanika horloĝo, la kvarca horloĝo kaj fine la atoma horloĝo. La sciencaj kaj teknikaj evoluoj ekde la lasta jarcento postulas pli kaj pli precizajn tempomezurojn, ekzemple, por la kunordigo de interrete interligitaj serviloj kaj por la uzo de persatelitaj navigadaj sistemoj.

Se vi volas scii pli pri la diferenco inter Loka Meza Tempo, GMT, UT, UTC kaj TAI (Tempo Atoma Internacia), pri meridianteleskopoj kaj atomaj horloĝoj aŭ pri la efiko de la malrapido de la tera rotacio sur tempomezurado, vi certe ne volos maltrafi ĉi tiun prelegon.

